

Heinrich Heine,  
En nord' unu pino en solo  
*tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof*

*Iomete ŝanĝita versio*

En nord' unu pino en solo  
Dormetas sur nuda altaĵ',  
Glacio kaj neĝa tavolo  
Ĝin kovras per tomba tolaĵ'.

Ĝi songas, ke palmo gracia  
Ĝi estas en orient',  
Eterne pri lando alia  
Sopiras ĝi en silent'.

*Traduko de la Germana poemo "Ein Fichtenbaum steht einsam" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, \*1859-12-15 – †1917-04-14).*

*Arg-1023-2074 (2014-05-23 14:39:50)*

*Mi, Manfred Retzlaff, aliĝis en 2014-05-23 la Zamenhofan tradukon tiel, ke la rim-skemo estas la sama kiel en la germana originalo.*

Heinrich Heine,  
Pinarbo staras sola  
*tradukita de Friedrich Pillath*

Pinarbo staras sola  
En nordo sur nuda altaĵ'.  
Ĝi dormas; el neĝ' kaj glacio  
Ĝin kovras blanka litaĵ'.

Songadas ĝi pri palmo  
Ĝemanta en orient',  
Soleca, sur arda deklivo  
En maldolĉega silent'.

*Traduko de la Germana poemo "Ein Fichtenbaum steht einsam" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de FRIEDRICH PILLATH (†1932-04.03).*

*Arg-1023-2287 (2015-03-19 16:43:44)*

*Tiun ĉi poem-tradukon mi, Manfred Retzlaff, trovis en <http://donh.best.vuh.net/Esperanto/Literaturo/Poezio/heine/pinarbo.html>.*